

STARTO

N-ro 3/2022 (284)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



16.7.2022

Automotoklub kaj Esperanto-Muzeo en Svitavy

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz/redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al: muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz: (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidanto: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (retejo, muzeo)

Kasisto: Andrea Švubová, Brněnská 3474-32A, 695 01 Hodonín, tel. 604 850 689, a.svubova@email.cz (membro-datumbazo, kontado)

Komitatano: Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světlá, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

Komitatano: Josef Kalčík, Za zámečkem 744/11, 158 00 Praha, j.kalcik@centrum.cz (konferencoj, kongresoj, kunlaboro kun ĈEJ, subvencioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 515 906 099

miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:

Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz, www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/

www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

DEKLARO DE LA 107-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN MONTREALO, KANADO

La 746 partoprenantoj - el 57 landoj - de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Montrealo, Kanado, de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2022, traktis la kadran temon “**Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj.**” Per teritoria agnosko en la malferma ceremonio de la Kongreso, ni esprimis nian profundan dankon al la diversaj indiĝenaj nacioj, unuavice la ganjenka popolo (Kaniien’kehá:ka, Mohawk), kiuj neniam cedis siajn rajtojn je tiu teritorio, kie ni kunvenis.

Per prelegoj, filmoj, diskutrondoj, kaj ankaŭ lingvokurso pri la aniŝinabeka, ni lernis pri la granda diverseco de indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj en Nord-Ameriko kaj tutmonde. Ni konstatis, ke indiĝenaj popoloj ludas gravan rolon en la konservado de naturaj resursoj kaj biologia diverseco, kaj estas portantoj de fundamentaj scioj por nia daŭripova ekzisto sur la Tero. Ni krome aŭdis kiel, malgraŭ multaj baroj kaj atakoj al iliaj rajtoj, tiuj popoloj organiziĝas por daŭre plenumi siajn tradiciajn okupojn, konservi siajn kulturajn praktikojn kaj aserti siajn rajtojn je siaj teroj.

Honore al la komenco de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj (2022-2032), nia Kongreso eldonis novan tradukon en Esperanto de la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj. Inter la multaj rajtoj agnoskitaj en tiu dokumento, ni aparte atentigas pri Artikolo 13, laŭ kiu “Indiĝenaj popoloj rajtas revivigi, utiligi, evoluigi kaj transdoni al estontaj generacioj siajn historiojn, lingvojn, buŝajn tradiciojn, filozofiojn, skribsistemojn kaj literaturojn, kaj asigni kaj reteni siajn proprajn nomojn por komunumoj, lokoj kaj personoj.” Kiel movado por lingvaj rajtoj, ni esprimas nian fortan subtenon al tiuj principoj.

La parolantoj de Esperanto alte taksas la valoron de kultura kaj lingva diverseco kaj kunlaboras por realigi lingvan demokration en monda skalo. Konforme al tiuj celoj kaj al la informoj kaj ideoj pritraktitaj en ĉi tiu Kongreso, ni deklaras nian solidarecon kaj subtenon al indiĝenaj popoloj en ties streboj por memdetermino, paco, justeco, kaj interkompreniĝo.



NOVA ESTRARO DE UEA (2022-2025): ESTRARAJ FAKOJ DIVIDITAJ

La nova mandato de la Estraro de UEA (2022-2025) komenciĝis la 13-an de aŭgusto 2022 kaj daŭros ĝis venonta elekto, antaŭvidata por la Universala Kongreso de Esperanto en 2025. Okaze de sia unua reta estrarkunsido, la 20-an de aŭgusto 2022, la Estraro dividis inter si la taskojn de la diversaj estraraj fakoj:

Duncan CHARTERS (Prezidanto) – Kunordigo, Strategio, Biblioteko, Esploro kaj Dokumentado;

Fernando Jorge PEDROSA MAIA Jr. (Vicprezidanto) – Centra Oficejo, Financoj, Kulturo, Kongresoj, Reta Agado, Ameriko;

Amri WANDEL (Vicprezidanto) – Scienca kaj Faka Agado, Revuo Esperanto, Terminologio, Meza Oriento kaj Norda Afriko;

Aleks KADAR (Ĝenerala Sekretario) – Administrado, Delegita Reto, Rilatoj kun Membro-Organizoj (Landa Agado), Rilatoj kun TEJO, Statuta Reformo;

Aurora BUTE – Instruado, Rilatoj kun ILEI, Eŭropo;

François LO JACOMO – Informado, Eksteraj Rilatoj, Amikoj de Esperanto, Esperanto-Centroj, Ĝemelaj Urboj;

Jérémie SABIYUMVA – Aktivula Maturigo, Afriko;

SO Jinsu – Eldonado, Azio kaj Oceanio.

Kontaktoj de la nova Estraro disponeblas ĉe <https://uea.org/asocio/estraro> aŭ en la kolofono de la revuo Esperanto.

GK UEA n-ro 1060

Premio Deguĉi 2022 al Osioka Taeko

UEA starigis la Premion Onisaburo Deguĉi en la Jubilea Jaro 1987. Ĝi distingas meritajn agantojn, kiuj longtempe laboras per Esperanto, por monda paco kaj homara feliĉo.

Per decido de la Estraro de UEA, la Premio Deguĉi de la jaro 2022 estas aljuĝita al: **Osioka Taeko**. Ŝi naskiĝis la 21-an de novembro 1948 en Hiroŝimo en Japanio kaj aktivas en la sama urbo. Ŝi estas esperantistino kaj aktivulino por paco, virinoj, homaj rajtoj kaj kontraŭ nukleaj armiloj.

Kun sia edzo (Osioka Moritaka, ankaŭ aktivulo de JEI) ŝi faris el sia hejmo la Hiroŝiman Esperanto-Centron. Pli ol 100 samideanoj de 30 landoj jam gastis en ilia hejmo, foje eĉ 11 gastoj samtempe.

En 2020 ŝi speciale prelegis kadre de la Monda Festivalo de Esperanto, okaze de la virtuala **Ekspozicio Hiroŝimo-Nagasako: 75 jaroj por paco**.



Laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA

Bildo de Petro Chrdle

12 DIPLOMOJ PRI ELSTARA AGADO aljuĝitaj en MONTREALO

En la Solena Fermo de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Montrealo estis anoncita la disdono de 12 diplomoj pri Elstara Agado aŭ pri Elstara Arta Agado por la jaro 2022. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007: Diplomo pri Elstara Agado.

Elstara Agado

1. Loka Kongresa Komitato (LKK) de la 107-a UK (Kanado) pro la multjara laboro (2014-2022) por reokazigo de UK en Kanado, pro intensa kunlaboro por retaj eventoj dum la pandemio kaj pro sukcesa laboro por la unua UK en pandemia epoko;

2. Pola Retradio (Pollando) pro la regulaj elsendoj ekde 2011, sukcese daŭrigante en la reta epoko la tradicion de la E-radio;

3. Adonis Saliba (Brazilo) pro la multjardeka fortigo de la E-komunumo kaj pro la laboro pri instruado de Esperanto en Brazilo, inkluzive kadre de la projekto Nesto kaj la lastatempe furora programo Mia Amiko, per kiuj ĉiujare plurcentoj da homoj pere de la portugala lernas Esperanton kaj kadre de kiu kunlaboras sub lia kunordigo dekoj da instruistoj;

4. Alexandrine Omba (D. R. Kongo) kaj Miora Rasoharinaivo (Madagaskaro) pro la kunfondo de Esperantista Virina Asocio de Afriko (EVAA), pro la kunorganizado de la unua Afrika Kongreso de Virinoj (AKVo), pro la konstanta aktiva instigo al virinoj lerni Espe-

ranton kaj pro longtempa instruagado por Esperanto en Afriko;

5. Ĉielismo Wang Tianyi (Ĉinio) pro la revivigo de Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) en 2010 kaj ĝia tenado ĝis nun, kun riĉa agado, ĉefe en la pandemia epoko kaj dum la UK-oj;

6. Povilas Jegorovas (Litovio) pro la longtempa agado kiel motoro de la litova E-movado, aparte pro la lastatempa organizado de la Baltiaj E-Tagoj (BET);

7. Robin Van der Vliet (Nederlando) pro la reta agado en Esperantujo, inkluzive la tradukon en Esperanton de la furora poŝtelefona apo Telegram, pro la traduka kunlaboro por la versio en Esperanton de Wordpress, pro la kunlaboroj kadre de Komputeko, Vikidatumoj, Vikipedio kaj aliaj retaj agadoj, ĉefe kadre de [Fonduso Instigo](#);

8. Klaus Leith (Germanio) *in memoriam*, pro la agado kiel gvidanto de la Komisiono pri Eŭropa Agado de UEA, interalie kadre de la informagado ĉirkaŭ la Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo, de Eŭropa Unio.

1.

Elstara Arta Agado

1. Zdravka Boytcheva (Luksemburgo/Bulgario) pro la plurjara gvidado de la Internacia Koruso kaj la muzika agado en Esperanto;

2. Joel Muhire (D. R. Kongo) pro la kontribuado al la muzika E-kulturo;

3. Wally Du Temple (Kanado) pro la kontribuoj originalaj kaj tradukaj al la E-literaturo dum multaj jaroj;

4. Ionel Oneț (Nederlando/Rumanio) pro la kontribuoj tradukaj kaj eldonaj al la E-literaturo kaj pro la longtempa servado al la Libroservo de UEA.

REZULTO DE LA BELARTAJ KONKURSOJ 2022

Venis entute 173 verkaĵoj.

BRANĈO POEZIO *Partoprenis 53 verkoj de 24 aŭtoroj el 17 landoj.*

La unua premio: ne aljuĝita.

La dua premio: “Reĝino-nokt” de Evgenij Georgiev el Kazahio.

La tria premio: “Mi ŝatus vidi...” de Benoît Philippe el Germanio.

Honora mencio: “La lampiro” de Sylvain Barrier el Francio. – “Cimbalaro” de Evgenij Georgiev el Kazahio.

BRANĈO PROZO *Partoprenis 38 verkoj de 22 aŭtoroj el 16 landoj.*

La unua premio: “Rekviemo” de Sara Spanò el Germanio.

La dua premio: “La pentraĵo” de Jorge Rafael Nogueras el Usono.

La tria premio: “Speguloj” de Sara Spanò el Germanio.

Honora mencio: “Strato Memoro” de Tobiasz Kubisiowski el Pollando.

BRANĈO MIKRONOVELO

Partoprenis 54 verkoj de 25 aŭtoroj el 16 landoj.

La unua premio (premio Paula Adúriz) – “La nigra truo” de Emanuele Bovio Regano el Italio.

La dua premio: “La bela kaj la bestio” de Francisco Javier Moleón el Hispanio.

La tria premio: “Kiu ĉeas?” de Pascal Vilain el Francio.

Honora mencio: “Laŭmorale” de Christian Rivière el Francio.

BRANĈO TEATRAĴO

Partoprenis 4 verkoj de 4 aŭtoroj el 3 landoj.

La unua premio: ne aljuĝita.

La dua premio: ne aljuĝita.

La tria premio: “La bakisto kaj la profeto” de Raffaele Del Re el Italio.

SUBBRANĈO MONOLOGO AŬ SKEĈO *Partoprenis 9 verkoj de 6 aŭtoroj el 6 landoj.*

La unua premio (premio María Cuevas): – ne aljuĝita.

La dua premio: ne aljuĝita.

La tria premio: “La Sekvanta” de Amir Naor el Israelo.

Honoraj mencioj: “Kurtfilmo” de Ewa Grochowska el Francio. – “Helpoferto” de Stela Besenyei-Merger el Hungario. – “Enkonduko al 'La Krizolo'” de Brandon Sowers el Usono.

INFANLIBRO DE LA JARO

Partoprenis 7 infanlibroj de 6 eldonejoj el 6 landoj.

Unu premio: Eldonejo Esperanto-Asocio de Britio, pro la verko “La domo ĉe Pu-Angulo” de A.A. Milne.

BRANĈO ESEO *Partoprenis 4 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj.*

La unua premio (premio Luigi Minnaja) – ne aljuĝita.

La dua premio: ne aljuĝita.

La tria premio: “La fundamentaj leĝoj de esperantista stulteco” de Federico Gobbo el Nederlando.

BRANĈO KANTOTEKSTO

Partoprenis 4 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj.

La unuaj premioj: “Ne foriru” de Ewa Grochowska el Francio, kaj “Mene-strelo” de Nikolaj Neĥajev el Rusio.

La dua premio: “Kiel la Tero belas” de Ewa Grochowska el Francio.

La tria premio: “De kie vi estas?” de Federico Gobbo el Nederlando.

Kongresa kuriero



Pri la kongresa agado informis ĉiutage la kongresa informilo nomata **Kongresa Sciulo** kun sciuro kiel maskoto. Aperis 7 numeroj, kiuj estas elŝuteblaj ĉe la retejo de UEA

<https://uea.org/kongresoj/UK/2022>

En la unua numero la UEA-prezidanto **Duncan Charters** enkondukis la kongreson per artikolo

Reveno al Kanado post 40 jaroj:

Post Lahtio en 2019, ni spertis neeviteblan paŭzon en la ritmo de la ĉeestaj Universalaj Kongresoj de UEA. Tamen fine venis la vico de la kanadaj esperantistoj, la sopirata UK, planita jam de multaj jaroj kun paŭzeco de preskaŭ 40 jaroj, post la Vankuvera Kongreso kiun mi ĉeestis kun almenaŭ kelkaj el vi. Interesa koincido kaj evoluo de Kongresaj temoj. En 1984, la ĉefa fokuso estis *Lingvaj minoritatoj: ĉu nur nacia fenomeno?* Kaj nun ni eniris la jardekon de indiĝenaj lingvoj proklamitan de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, kies celo efektive inkluzivas la agnoskon de ĉiuj lingvaj minoritatoj. La fokuso en nia ĉi-semajna UK intence subtenas la progreson en la monda konscio pri la graveco de indiĝenaj kaj minoritataj lingvoj kaj kulturoj, kaj la danĝeroj al la diverseco de perspektivoj kiun reprezentas ilia neglekto aŭ eĉ malapero.. En oktobro de 2019, kiel nova prezidanto de UEA mi

pasigis preskaŭ semajnon en Montrealo kun la LKK dum vizito de nia tiama Konstanta Kongresa Sekretario (KKS), Clay Magalhães. Lia ĵusa forlaso de tiu posteno aparte memorigas min ke li alportis tiuokaze sian multjaran sperton pri la organizado de la fenomeno de Universalaj Kongresoj, kuraĝigante la novan LKK kaj ĝojante pri ilia iniciatemo kaj laboremo. Kvankam 2020 ne povis esti la jaro de efektiviĝo, 2022 jes! En nia nuna mondo, granda nombro da konferencoj kaj kongresoj fariĝis virtualaj aŭ hibridaj pro la evoluo de reta videa teknologio. Tamen restas la deziro de interhoma kontakto, kiu ekde la mejloŝtona renkontiĝo de parolantoj de la lingvo en 1905, en Bulonjo-ĉe-Mar, donis grandan impeton al la lernado de lingvo kiu permesas transalti naci-lingvajn barojn. Por kio? Interalie por komunikiĝi egalbaze kun homoj plej diversoriginaj pri niaj intereso kaj la bezonoj de nia mondo. La defioj kiujn ni frontas ne estas novaj, kvankam ni povas senti ke ili estas en nia epoko minace severaj por kiuj deziras vivi en paco en daŭripova mondo. Do sojle de nova strategia planado de UEA mem, ni deziras ke vi profitu la okazon por dividi kun ni viajn ideojn, pensojn, konvinkojn pri la estonteco de nia movado, kaj ĝia kontribuo al pli interkomprenema kaj paca mondo. Pandemio estas evidente malagrabra defio por la homaro, tamen en la historio montriĝis fenomeno studita jam en unu el niaj virtualaj renkontiĝoj pri *pozitivaj efikoj de la pandemio*: pli da kreemo kaj inventemo por solvi mondajn problemojn; plispertiĝo pri la uzado de teknologio por kunigi kaj partoprenigi

fino sur la paĝo 74

Novajoj de la eldonejo KAVA-PECH

La 9-an de junio KAVA-PECH per modesta festeno retrorigardis 30 jarojn de sia ekzisto kun fokusiĝo al la novaĵoj eldonitaj dum la pandemio. Mi mencias nur tiujn, kiujn mi ne menciis en pasintaj numeroj de Starto.

Ĉiuj prilaborataj libroj, kiujn mi promesis eldoni antaŭ la festeno, ankaŭ reale aperis; krom tiu menciita por pli malproksima tempo, nome *Sadako volas vivi*, por kiu mi ankoraŭ ne sukcesis akiri kopirajton. Sed per tridekjariĝo de la eldonejo ne finiĝis ĝia agado!



Interesa estis projekto finita per apero de la libro *Amo, tuso kaj forpaso* kun la subtitolo *Homo kaj kovimo*. Ĝi estas rezulto de Interkultura Novelo-Konkurso, tamen ĝi enhavas nur la tri-

dekono da noveloj elektitaj de la internacia juĝkomisiono, por ke ili eniru finalon. El ili estis sekve elektitaj 5 elstaraj, el kiuj du ricevis la trian premion, du la duan, kaj venkis la verko de portorika aŭtoro Jorge Rafael Noguera *Amo en la tempo de kovimo*.

Mi devas konfesi, ke mi estis agrable surprizita, kiam la ĉefredaktoro de la almanaho François Bolduc el Kanado alparolis min, ĉu mi pretus la libron eldoni. Mi volonte konsentis, ja tio estis eĉ honoro por mi. La propra eldono estis vere internacia afero: la ĉefredaktoro jam menciita kanadano, kunredaktorino Stela Besenyei-Merger el Hungario, juĝkomisionanoj el pluraj landoj, kovrilpropono Anna Lobo de Carvalho el

Brazilo uzante fotojn de Bong Sou el Kanado, grafika preparo Luděk Neužil, mia grafikisto, do el Ĉeĥio, kaj presita ĝi estis en Kanado, ĉar danke al anonima sponsoro la libron ricevis donace ĉiuj partoprenantoj de la kongreso. Tial pro la permesita pezo de valizo mi portis hejmen el Kanado nur 30 ekzemplerojn kaj la reston de la stoko mi ricevos perpoŝte.

Nu, la projekto ŝajnas al mi tiel interesa, ke la verkon jam ĉeĥigas Jindřich Košťálek kaj espereble baldaŭ ĝi aperos ankaŭ por la ĉeĥa merkato, kio povos denove iom levi la konscion pri la utileco de Esperanto.

Temis pri la unua Interkultura Novelo-Konkurso kiu tamen strebas fariĝi tradicia. Jam estas elskribita temo por la dua, nome *Nokta vojaĝo*. Eventualaj interesiĝantoj partopreni povos aliĝi kun siaj kontribuoj ĝis la 30a de septembro. Ĉiujn detalojn oni trovas ĉe la retejo de Akademio Literatura de Esperanto.

Plia prilaborata eldonaĵo, kiun mi momente redaktas, havas la titolon *Eli Urbanová* kun la provizora subtitolo *Omaĝe al la centjara jubileo de la poetino*. Ĝi enhavas jenajn partojn: Enkonduko (Chrdle), Peza vino (jam eldonita de KAVA-PECH, sed preskaŭ la tuta stoko dronis dum la inundo en la jaro 2002), Ĉion kulpas viroj, Konsiloj al komencantaj poetinoj (ĉiuj ĉi de Eli), Vivopriskribon de Eli (Malovec), Eli Urbanová en datoj (Malovec) kaj Personaj rememoroj (Chrdle). Sed mi pripensas aldoni ankoraŭ iujn tekstojn de Eli. Mi esperis, ke ĝi aperos antaŭ la ĈEA-konferenco, sed bedaŭrinde pro pluraj malhelpoj (inter ili ankaŭ mia pigreco)

tio ne sukcesos, sed certe ĝi aperos ene de ĉi tiu jubilea jaro.

Iuj de vi scias, ke mi travivis seriozajn malsanojn (krom alie mi estis kvin semajnojn hospitaligita post kovim); mi eĉ povas diri, ke dum la lastaj jaroj jam trifoje mi fuĝis el la ŝovelilo de entombigisto. Sed espereble mi ne forpelos tion, se mi diros, ke mi jam rekolektis sufiĉe da energio kaj se iuj aŭdis de mi en tiuj krizaj momentoj, ke mi planas fini kun la eldonejo, do nun mi deklaras, ke tion mi prokrastas ĝis nedifineco, ĉar temas pri mia hobbio, sen kiu mi ne povas imagi mian vivon. Do la fino de la aktivecoj de KAVA-PECH restas nur en la manoj de Dio.

Petro Chrdle

Maskerado en la radiostacio ĈRo PLUS

Ĉiam tre grava okazo estas, se pri Esperanto interesiĝas neesperantistoj mem. Ja estas klare, ke tiu, kiu montras meminiciate intereson, tiu ankaŭ multe pli atente perceptas la informojn ol informojn nepetatajn. Tio validas ne nur se temas rekte pri Esperanto, sed ankaŭ se temas pri io, kie Esperanto ludas iun rolon kaj do la informo pri ĝi povas kaŭzi pliajn demandojn.



Tion mi jam spertis plurfoje, precipe kiam mi eldonis la librojn tradukitajn el Esperanto. Al tiuj apartenas ankaŭ du libroj de Tivadar Soros en traduko de Jindřiška Drahotová, nome *Maškaráda kolem smrti* eldonita

en la jaro 2014 kaj *Robinsoni na Sibíři* en la jaro 2016. Parenteze, por Maskerado ĉirkaŭ la mondo mi ricevis tre pozitivan eĥon de la juda komunumo en Prago, nome ke ĝi, kaj precipe la klarigoj de Humphrey Tonkin fine de la libro, estas la unua fonto en la ĉeĥa, kiu tiel detale priskribas la tempon de la holokaŭsto en Hungario, do ĝi estas ege valora!

Antaŭ ol veni al la poparta legado de la libro en radio, decas menci la historion de tiu ĉeĥa versio de Maskerado. Kiam mi ricevis la tradukon de Jindřiška, mi tuj ekkonis ĝian historian valoron kaj cerbumis, kiel ĝin eldoni, ĉar mankis al mi sufiĉe da mono. Ja la verko meritas ankaŭ belan aspekton kaj bedaŭrinde ne estas eĉ malgranda espero, ke la enigita mono povus almenaŭ duone reveni per vendoj.

Mi do turnis min al mia amiko Humphrey, jam menciita aŭtoro de la klarigaj notoj, kiu havas bonan rilaton al la filo de la verkinto kaj kopirajtposedanto, mondkonata financisto kaj filantropo George Soros, ĉu li afable petus de li ne nur senpagan kopirajton por la verko de sia patro, sed eĉ ioman subtenon de la ĉeĥa eldono. Tio realiĝis kaj mi ricevis ne nur la senpagan kopirajton, sed eĉ la mendon por 150 ekzempleroj antaŭpagitaj, de kiuj mi devis sendi 20 ekzemplerojn al Soros kaj la ceterajn disdoni nome de G. Soros al de mi elektitaj bibliotekoj. Tial nun en multaj bibliotekoj, kvankam ili verŝajne ne aĉetus ĝin, oni posedas Maskeradon en sia libra fonduso kaj tiuj do povas servi al la legantoj. Sub similaj kondiĉoj aperis ankaŭ Robinsonoj.

Nu, pasis jaroj kaj decembre 2021 mi ricevis retmesaĝon de la „fako de dramo

kaj literaturo“ de la Ĉeĥa Radio kun la peto pri la kopirajto por *Maŝkaráda kolem smrti*. Mi respondis, ke mi neniam postulas de aŭtoroj aŭ tradukantoj ekskluzivan kopirajton, kiu do tiuokaze restis ĉe la filo de la forpasinta aŭtoro kaj ĉe la tradukintino. Sed mi promesis helpi al ili ricevi la kopirajtojn.

Do, post plia konsulto ĉe Humphrey mi denove turniĝis al s-ro Vachon, kiu subskribis la antaŭajn licencajn kontraktojn komisiite de G. Soros kaj kun lia permeso mi transdonis lian retadreson al la radio, same kiel rekontakton al Jindřiška, kun kiuj oni jam fintraktis la permesojn memstare.

La rezulto estas tre pozitiva. La dekparta legado de la ĉeĥa versio de *Maskerado* okazos ĉiutage ekde la 21a de septembro en la radiostacio ĈR PLUS, ĉiam kun la komenco je 23:33. Tamen, ne necesos noktumi, se iu kutimas enlitiĝi pli frue, ĉar ĝi estos atingebla ĉiam unu monaton post la disaŭdigo libere en la retpaĝaro de la radio, sed nur por aŭskulti, sen eblo elŝuti ĝin.

Do, gratulon al Jindřiška, kiu certe estos nomita kiel tradukistino. Kaj, kvankam mi ne povas influi tion, preskaŭ certe estos menciita ankaŭ la origina lingvo de la libro, el kiu la ĉeĥa versio estis tradukita, kio espereble denove iom levos la demandojn pri Esperanto, eble kun kutima miro *Ĉu ĝi ankoraŭ vivas?*

A stručně pro začátečníky česky:

Maŝkaráda kolem smrti od Tivadara Sorose, přeložená z esperantského originálu *Maskerado ĉirkaŭ la morto* Jindřiškou Drahotovou bude čtena na pokračování každý den počínaje 21. 9. 2022

na rozhlasové stanici ĈR PLUS od 23:33. Přesto kvůli tomu nemusíte ponocovat, protože program bude jeden měsíc zachován na internetu, i když jen pro čtení bez možnosti stažení. Samozřejmě to nebude kompletní text knihy se všemi vysvětlivkami, ale pokud vás to zaujme, knihu si můžete zakoupit (případně objednat, pokud ji nebudou mít na skladě) ve všech dobrých knihkupectvích, nebo přímo v nakladatelství KAVA-PECH či v muzeu esperanta ve Svitavách.

Petr Chrdle

fino el la paĝo 74 (Reveno al Kanado):

individuojn kiuj restis ekster niaj aktivaj rondoj pro nekapablo vojaĝi; konscio ke tio kio nun unuigas povas esti pli forta ol la elementoj kiuj nin dividas. Kaj tio malgraŭ la fakto ke decidoj de registaroj reliefiĝis nian homan respondecon resti pli komprenemaj ol kondamnemaj; pli elmontremaj de bonkoreco al suferantoj kaj al niaj kunhomoj ĝenerale; pli konsciaj ke por havi pacan mondon necesos ke la popoloj kuniĝu preme al konfliktoŝolvado por malakceptigi la ideon de perfortado kaj detruado kiel necesaj por solvado de kolizioj de intereso inter la popoloj kaj iliaj registaroj. Ĉu UEA meritas brilan novan rolon en nia mondo? Se jes, ĝia kerno vidiĝu dum ĉi tiu semajno en multkultura Montrealo, montrante ke ni povas kunpensi, kune plikleriĝi, kunestimi niajn kunulojn, kaj ne forgesi ĝui nian kunestadon en bela esplorinda nova loko... en nia ŝajne senlime konfliktema mondo, ni ne neglektu kial ni lernis Esperanton kaj kion nia praktika uzo de la lingvo povas signifi por niaj terglobaj najbaroj!

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2023

Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA alvokas ĉiujn beletremulojn partopreni per altkvalitaj verkoj en BK-2023. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. Endas sekvi jenajn regulojn:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita.

Prozo: maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj).

Mikronovelo: (maksimuma longo 100 vortoj). La unua premio nomiĝas *Premio Paula Adúriz*.

Teatraĵo: maksimuma longo ne fiksita.

Teatraĵo, subbranĉo Monologo (unupersona teatraĵo) aŭ Skeĉo (unu-aŭ divers-persona): daŭro inter 10 kaj 15 minutoj. La unua premio nomiĝas *Premio María Cuevas*.

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj). La unua premio nomiĝas *Premio Luigi Minnaja*.

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2022. Aljuĝata estas nur unu premio.

Kantoteksto: maksimuma longo ne fiksita.

La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la **31-a de marto 2023**.

Oni sendu po unu tajpitan ekzempleron de ĉiu konkursaĵo – krom en la branĉo Infanlibro de la Jaro – al *Belartaj Konkursoj de UEA*, ĉe *Miguel Gutiérrez*

Adúriz, prefere retpoŝte al unu el la jenaj adresoj: belartajkonkursoj@gmail.com; bk@co.uea.org; aŭ, se tio ne eblas, papere al la adreso: *los Coteros 1-C, 2 Izda, 390600 Muriedas; Cantabria; Hispanio*, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. Por la branĉo Infanlibro oni sendu unu ekzempleron de la koncerna libro al la adreso de *Miguel Gutiérrez Adúriz* kaj tri ekzemplerojn al *Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*, kun noto, ke temas pri kandidatigo de la libro al tiu ĉi branĉo.

Premioj: En la branĉoj *Poezio*, *Prozo*, *Teatraĵo* kaj *Eseo*: unua premio 260 €, dua premio 182 €, tria premio 104 €. En la branĉo Infanlibro de la Jaro 546 €. En la branĉoj *Mikronovelo* kaj *Kantoteksto*, kaj en la subbranĉo *Monologo aŭ Skeĉo*: unua premio 100 €, dua premio 25 €, tria premio 25 €. Cetere, la teksto ricevinta la unuan premion en la branĉo *Kantoteksto* estos muzikigita kaj la rezulta kanto estos diskonigita en ludado fare de kantisto aŭ kantogrupa.

Detala regularo troviĝas en la [retejo](#) de UEA. La verkoj de BK premiitaj en 2023 legeblas en la volumo *Belarta rikolto 2023*, eldonota de Mondial. La premiolistoj ekde la komenco de la Belartaj Konkursoj en 1950 troviĝas ĉi tie:

esperanto.net/literaturo/bk/index.html.

Estas tre rekomendate al interesatoj pri BK akiri kaj legi la *Belartajn Rikoltojn* (eldonataj ekde 2013) kaj [aliajn verkojn](#) BK-rilatajn.

Laŭ GK UEA m-ro 1063

TRANSDONO DE LA ARKIVO DE UEA AL LA ESPERANTOMUZEO DE LA AŬSTRIA NACIA BIBLIOTEKO

En 2021 la Komitato de UEA akceptis la rekomendojn de la Estraro, Komisiono pri Financo kaj konsilantaj komisiitaj fakuloj, ke la Arkivo de UEA kaj ne-duoblaĵoj de la Biblioteko Hector Hodler, kiuj troviĝas en la Centra Oficejo (CO) en Roterdamo, estu transdonotaj al la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko (ANB) en Vieno. La CO ne havis fizikajn kondiĉojn tiajn, kiajn havas profesia institucio kiel ANB por la konservado de tiuj materialoj, nek disponas fakulojn por ilia katalogado.

En la unua semestro de 2022 UEA kaj ANB kompletigis la unuan etapon de tiu laboro, nome la unuan identigon kaj transporton de la materialoj de Roterdamo al Vieno. La transdono okazis surbaze de donackontrakto, kiu certigas la konservadon de la donitaĵoj fare de ANB **por ĉiam** kaj laŭ la internaciaj normoj adoptitaj por la administrado de palpeblaj moveblaj kulturaj heredaĵoj, kiel estis identigitaj la arkivo kaj ĉiu donacitaj materialoj fare de UEA. [Laŭ agnosko de ANB](#) la Arkivo de la UEA estas “mondskale unu el la plej ampleksaj kaj gravaj arkivoj pri Esperanto kaj la internacia Esperanto-movado.

La UEA-arkivo elstaras per sia abundeco kaj diverseco. Ĝi enhavas arkivaĵojn same kiel ampleksajn kolektojn de afiŝoj, fotoj kaj aŭdvidaj dokumentoj. Tiel ĝi ebligas profundajn kultursciencajn kaj filologiajn esplorojn pri Esperanto”.

Unu el la celoj de la transdono ankaŭ estis tio, ke nun la materialo fariĝu pli strukture kaj profesie disponigata al

esploristoj, kio ne povis rutine okazi en la CO pro manko de katalogo, strukturo kaj laborfortoj.

Efektive la dua etapo de la laboro estas la finkatalogado kaj disponigo, inkluzive de ciferecaj kopioj, al la interesata publiko. Laŭ ANB “aldone al la ĉiutagaj taskoj la bibliotekistoj en la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj nuntempe paŝon post paŝo alirebligas tiun valoran trezoron por la publiko. Unuaj dokumentoj jam estas katalogitaj kaj ciferecigitaj. Kvankam la arkivaĵoj estas ankoraŭ en la originaj skatoloj, kiuj dum la venontaj monatoj estos ŝanĝitaj per novaj senacidaj skatoloj, interesitoj kaj esploristoj jam nun povas peti inventarliston de la arkivo kaj mendi dokumentojn por studado en la legosalono de la Esperantomuzeo”.

“Inter la libroj estas la unuaj lernolibroj en la araba (Kairo 1904), greka (Samoso 1907) kaj kartvela (Tifliso 1909), kiuj bone montras, ke Esperanto jam antaŭ la unua mondmilito disvastiĝis ekster la pli grandaj Eŭropaj lingvo-komunumoj. La arkivo enhavas multnombrajn dokumentojn pri UEA kaj la Esperantomuzeo de ANB. La en 1927 fondita Esperantomuzeo estas mondscale unu el la plej tradiciriĉaj lingvo-muzeoj kaj unu el la plej gravaj siaspecaj institucioj. La muzeo kun la alligita Kolekto por Planlingvoj dokumentas ĉirkaŭ 500 planlingvajn projektojn. Per pli ol 150 mil dokumentoj kaj objektoj, inter ili 75 personaj kaj instituciaj arkivoj, la kolekto konservas kaj disponigas la plej ampleksan fakbibliotekon pri Esperanto, planlingvoj kaj interlingvistiko en la mondo”. La transdono okazis sen kostoj al UEA.

GK UEA n-ro 1045

Rozo „Esperanto“

Rozon multaj homoj opinias „reĝino“ de floroj. Riĉecon de diversaj rozoformoj ni kutime rimarkas nur kiam ni vizitas rozejon aŭ profesionan ĝardenegon en la sezono printempa kaj somera. Inter la rozoj oni trovas abundon da koloraj varioj, miniaturajn ĝis metrajn plantojn ktp. Nun apenaŭ iu kapablas kalkuli, kiom da rozaj varioj estis selektitaj dum jarcentoj el la originaj specioj kreskantaj en la naturo. Eĉ la sciencistoj mem ne samopinias, kiom da originaj varioj ekzistas (100 ĝis 300).



En la kolektoj de Rozejo Olomouc troviĝas negranda, flave floranta kultivaro nomata „Esperanto“. La rozo alta ĝis 70 cm kaj havanta duoblan floron kun diametro ĉirkaŭ 90 mm estis selektita de monde rekonata ĉeĥoslovaka kultivisto Jan Böhm (1888 – 1959) en la jaro 1932.

Kio estis instigo por Jan Böhm doni al la rozo tian nomon, ni jam apenaŭ ekscios. Ion sugesti povas nomoj de aliaj rozoj, kiuj pruvas ĉeĥan patriotismon (Doktoro Masaryk, Božena Němcová, Alois Jirásek, Smetana, Tomáš Baťa ktp.). Evidente jam tiam la homoj sopiris pri paco kaj unuiĝo de la homaro post spertoj de la unua mondmilito.

La rozon Esperanto ni trovas en la gazeto de usona societo dediĉanta sin al kultivado de rozoj „American Rose Society“ el la jaro 1933.



Se vi renkontis tiun ĉi rozon en kolekto de aliaj rozejoj, skribu al ni, por ke ni povu krei mapon de lokoj en la mondo, kie troviĝas ĉi tiu belege floranta rozo.

Jan Richtř

muzeagrupo@esperanto.cz

Jam en Starto 4/2007, p. 123, informis Pavel Sittauer pri alia floro kun la nomo de la internacia lingvo:

Tulipoj Esperanto

Nederlanda firmao Bakker pri tulipoj en sia aŭtuna katalogo 2007 ofertas tulipojn Esperanto (Tulipa viridiflora Esperanto), la ĉeĥa filio en Pardubice sub la kataloga numero 0830-08 kontraŭ 239 Kč por 12 pecoj. La filioj ekzistas ankaŭ en aliaj landoj, sekve oni povas trovi la saman retejon pri la tulipo en diversaj eŭropaj lingvoj, la ĉeĥa sub adreso:

<http://www.bakker-cz.com/index.aspx>.

Elekto de estraranoj kaj direktoroj de la Akademio, novaj sekcio kaj komisionoj

La 29an de Junio, ĉiuj 45 akademianoj estis voĉdonintaj por elekti la estraranojn kaj direktorojn de la Akademio de Esperanto en la postenperiodo 2022 – 2025.

Kiel estraranoj estis elektitaj:

Probal Dasgupta, prezidanto
Brian Moon, vicprezidanto
Bertilo Wennergren, vicprezidanto
François Lo Jacomo, sekretario

Kiel direktoroj estis elektitaj:

Orlando Raola – sekcio pri faka lingvo
Jesper Jacobsen – sekcio pri ĝenerala vortaro
BAK Giwan – sekcio pri gramatiko
Lee Miller – sekcio pri kontrolado de lerniloj
Kirilo Brosch – sekcio lingva konsultejo
Carlo Minnaja – sekcio pri literaturo
Probal Dasgupta – sekcio pri prononco
Carlo Minnaja – komisiono historio de la Akademio
Barbara Pietrzak – komisiono homaj nomoj
Mariana Evlogieva – komisiono revizio kaj prizorgo de la reta versio de la Fundamento
Javier Alcalde – komisiono socia historio de Esperanto
Lee Miller – komisiono pri komunikado
Aleksandro Shlafer – sekcio interkonsilejo

Komisiono revizio kaj prizorgo de la reta versio de la Fundamento estas nova, pli ekzakta nomo de la komisiono nova eldono de la Fundamento kreita en 2019.

Komisiono socia historio de Esperanto estis kreita en 2019 kaj pristudas historion de esperantistoj, kiuj ĉefrolis/as ekster Esperantujo.

Komisiono pri komunikado estis kreita en 2020 kaj prizorgas interalie la retejon de la Akademio, sed ankaŭ aliajn komunikilojn.

Sekcio interkonsilejo ĵus kreiĝis, por rapide pridiskuti lingvajn demandojn, kiujn ĝiaj membroj bezonas solvi por siaj eksteraj agadoj sen atendo de formala akademia decido.

Krome, konforme al partneriĝo kun UEA pri KER-ekzamenoj akceptita de la Akademio la 25an de marto (vidu gazetaran komunikon de UEA n-ro 1032, 2022-03-30), la estraroj de la Akademio kaj de UEA interkonsentis, la 21an de majo, pri la **Akademia KER-ekzamenkomisiono**, kiu kunlabore kun la KER-teamo de UEA kontrolos la nivelon kaj tekstojn de la KER-ekzamenoj nome de la Akademio. Ĝi estas gvidata de Marc van Oostendorp kaj enhavas ok pliajn Akademianojn: Duncan Charters; Grant Goodall; Jesper Jacobsen; Ruth Keves-Cohen; Jouko Lindstedt; Lee Miller; Giridhar Rao; Nicola Ruggiero. En la KER-teamo de UEA estas kroma akademiano: Renato Corsetti.

La estraro de la Akademio

Oficiala Informo n-ro 38 – 2022-07-04

Kunlaboro de Automotoklubo kaj esperantistoj de Svitavy

La sabata antaŭtagmezo la 16-an de julio 2022 estis festo por Automotoklub Svitavy. Nome, okazis ĉiujara kolektiĝo de aŭtomobilaj veteranoj kaj alveturis posedantoj de malnovaj veturiloj el la tuta respubliko. La estraro de AMK proponis al la loka esperantista klubo eblon prezenti Esperanton kaj Esperanto-Muzeon. Ni akceptis la proponon ĝoje kaj antaŭ la Inform-Centro tuj apud la registrejo de partoprenantoj ni starigis nian standon.





Ni ofertis propandajn materialojn kaj aliajn Esperanto-objektojn. Sinjoro Richtr el nia klubo ĉiĉeronis en la turo de la preĝejo de Ĉieliro de Maria sur la placo, en Esperanto-Muzeo ni konatigis interesatojn pri la historio kaj nuntempo de la Esperanto-movado, kaj akompanis ilin tra la Ottendorfer-domo. Inter la vizitantoj estis sinjoro, kies patro lernis Esperanton en mezlernejo en la tempo de la unua respubliko. Nepo de Anjo Ahlstedt, kiu edziniĝis al finnlanda esperantisto kaj longe vivis en Finn-

lando, estis tre surprizita, kiam li en nia stando eksciis, ke nia klubanino Ilonka ĉeestis nupton de lia avino. La aranĝo sukcesis kaj venontjare ni volonte ripetos ĝin.



Libuše Dvořáková

Virtualaj kunvenoj de EK Brno



www.esperantobrna.cz

Historio de la unua sukerkubo en la mondo

Dolĉigi teon aŭ kafon antaŭ preskaŭ 180 jaroj ne estis tiel facile kiel nun. La dommastrinoj unue devis diserigi la sukeron por kuiru uzo al pli malgrandaj pecoj de sukera konusforma granda peco ĝis 1,5 m alta. Tio tute ne estis facila, precipe por virinoj. Ili devis uzi specialan fendilon, kiu ebligis kaj faciligis tiun laboron - vidu la bildojn sube:



Sukerbetaj
radikoj


Vi povas vidi, ke dekstra parto de la fendilo fakte estas hakilo, maldekstra parto servas kiel malgranda marteleteto.

Kiam, kie kaj kial unue aperis sukero en formo de sukerkubo

Post la fino de napoleonaj militoj, en la 1820-aj jaroj, la Habsburga monarkio renovigis eksperimentojn kun la produktado de sukero el sukerbeto. En la 1840-aj jaroj okazis en Eŭropo industria revolucio, kies efiko estis precipe rimarkebla en lokoj kie edukita nobelo staris ĉe la kapo. Tia persono estis ankaŭ Karl Anton Maxmilian Dalberg (1822-1908) – loĝejo de lia familio fariĝis **la kastelo en Daĉice** (*legu: Daĉice*).



Kastelo Daĉice



Ĉeĥa respubliko (Bohemio, Moravio, Silezio)

La unua sukerfabriko de la moderna periodo en tiu ĉi parto de iama Habsburga monarkio (vidu mapon de nuna Ĉeĥa resp.) estis fondita en 1829 en la vilaĝo Kostelní Vydří apud Daĉice en la bieno de Karl Maxmilian Dalberg. Pri la establado zorgis du fratoj Tomáš (= Tomáš) kaj František (= František) Grebner(oj). Sed la grundo ĉirkaŭ Daĉice ne estis tro taŭga por kultivado de sukerbeto. Tial la sukerfabriko mem ne longe daŭris en Kostelní Vydří kaj jam en 1832 ĝi devis ĉesi sian funkciadon.

Tamen, la entreprena agado de **František Grebner** (1791-1851) ne finiĝis per fiasko de la sukerfabriko en Kostelní Vydří. En 1833, kun la financa subteno de la viena bankisto **Karl von Puthon** (1780-1863), li establis sukerrafinejon rekte en la **urbo Dačice**. Komence, ĝi prilaboris nur kansukeron importitan de la itala ŝiphaveno Triesto, sed post 1844 ĝi prilaboris ekskluzive betsukeron de enlandaj fontoj. En 1839, aliflanke, la firmao renkontis monmalfacilaĵojn. Printempe de 1840 tial estis vokita el Vieno al Dačice **Jacob Christoph Rad** (1799-1871) por iĝi la direktoro de la loka rafinejo. Rad estis sendube tre teknike kapabla kaj tuj post sia nomumo li eklaboris modernigi la fabrikon.

Kun la alveno de la nova direktoro J. Ch. Rad komenciĝis la plej fama periodo de la rafinejo Dačice. Sub la nova administrado la firmao dungis tridek konstantajn laboristojn aldone al oficialuloj kaj helpkunlaborantaro. Per sukero de tiu ĉi rafinejo estis provizitaj la regionoj de Dačice, suda kaj orienta Bohemio kaj proksimaj aŭstraj limregionoj. Sukero ankaŭ estis vendata en stokejoj de la rafinejo Dačice starigitaj en Vieno, Peŝto (nuna Budapeŝto), Lvivo (Ukraino) kaj Brno en Moravio.



Unuaj skatoletoj kun sukerkuboj



*Ĉeĥa poŝtmarko (2019)
Temo: Invento-sukerkuboj*



*Jacob Christoph Rad
(1799-1871)*

Kiel vi jam scias de supre, ĝis mezo de la 19-a jarcento, sukero estis plejparte konata nur en la formo de sukerkonusoj. Ne malofte, malagrablaj vundoj okazis, kaj dolora kriego disvastiĝis de la manĝprepara ĉambro al la loko de la agrablaodoro. Simila situacio okazis iun someran tagon en 1841, kiam s-rino Juliana (la edzino de la direktoro Jacob Rad) venis al sia edzo kun bandaĝo sur la mano, taŭge kolera: „Rigardu, kio okazis al mi! Venontfoje ni povos detranĉi tutan fingron, ĉu mi, aŭ unu el viaj filinoj. Ĉu vi vere ne povas elpensi pli utilajn malgrandajn pecojn de sukero?!“

Invento

La edzo Jacob tre interesiĝis pri la malagrabla okazaĵo kun la vundita fingro de sia edzino. Do li komencis demandi, kiajn pecojn da sukero li faru por plenumi pli da postulojn? Liaj klopodoj kulminis per la invento de ĉelaro por la produktado de sukerkuboj. Jakob inventis specialan matricon kun 400 ĉeloj, kiu transformis kristalan sukeron al kuboj, preskaŭ kiel ni konas ilin hodiaŭ.

Li venis al sia edzino kaj diris: „Juliana, mi havas donacon por vi. Io, kion vi delonge deziris" kaj montris al ŝi skatoleton kun ĉirkaŭ 350 sukerkuboj. "Tio estas belega," Juliana hurais: "... per tiuj ĉi malgrandaj kubetoj, dolĉigo estos por mi ĝojo!"


Jacob Christoph Rad konsciis pri la potencialo ofertita de sukerkuboj kaj pasigis la venontajn monatojn laborante pri la metodo de amasproduktado. Li devis solvi teknikajn problemojn kaj travivi obstaklojn metitajn de oficiala burokratio. Li finfine sukcesis en ambaŭ direktoj. Unue, li akiris imperian privilegion (ekskluzivan rajton) por sia proceduro, tiam patenton, kaj finfine, dum aŭtuno 1843, li komencis produkti en la Dačice-rafinejo sukerkubojn por la merkato.

Jacob Christoph Rad, iama direktoro de la sukerrafinejo en la urbo Dačice estas konsiderata la inventinto de sukerkuboj (tiam nia lando - t.e. Ĉeĥio + Moravio + Silezio) apartenis al Habsburga monarkio (vidu mapon pli supre). Al la fakto, ke Jacob Christoph Rad estis la unua produktanto de sukerkuboj, fakte helpis lia edzino Juliana.

La kubetoj, kiuj estis pli taŭgaj por kuira uzo, elflugis en la mondon kaj festis grandan sukceson. Post kiam ili ricevis „aplaŭdojn“ en Vieno – la ĉefurbo de Habsburga monarkio, kelkaj landoj (Prusio, Saksio, Svislando, Anglio) aĉetis koncesion por sia produktado, kaj la sukcesa kampanjo de la sukerkubo ĉirkaŭ la mondo komenciĝis. La plibonigita formo de la invento de Rado daŭre estas uzita fare de sukerrafinejoj ĉirkaŭ la mondo hodiaŭ.

Sukero venas en multaj formoj (en Ĉeĥio)

En nia lando estas sukero dividita laŭ grajna grandeco je la sukero kristala, la sukero semolina kaj la sukero faruneca (ĉeĥa branĉnormo difinas la maksimuman "grengrandecon" de ĉi tiuj individuaj frakcioj). Premado de sukerkristaloj produktas malsamajn specojn de sukerkuboj. La unuaj serioj de la sukerkuboj havis formon de kuboido proksima al kubo kun randaj dimensioj de 1,2 cm kaj 1,5 cm. Poste, la dimensioj komencis diferencii inter malsamaj fabrikantoj, kaj la formo ankaŭ ŝanĝiĝis de kubo al diversaj geometriaj formoj, inkluzive de, ekzemple, la formo de simboloj de la Rummy-kartludo – keroj (koroj), trefoj (krucoj), karooj kaj pikoj:



Ĝeliga sukero (por fari marmeladojn) enhavas pompektinon kaj citritan acidon krom sukero kiel ĝeliga agento. Fajna kristala sukero estas miksitita kun citra acido por siropa sukero. Por fari bersiropo kaj ŝtonfruktan (drupan) siropo, pektinazo estas aldonita al la siropa sukero por malhelpi ĝeligaĉadon. Blanka kaj bruna sukero akiriĝas el altkvalita sukero per libera kristaliĝo. Bruna sukero estas kristala sukero, kiu estas rafinita (kolorita) per melaso.

Sukero havas praktike senliman bretdaŭron se konservita ĝuste!!!

Pezo

Unu sukerkubo kutime pezas 3 ĝis 6 g (tipe 5 g). Tamen, pli malgrandaj kaj pli grandaj sukerkuboj ankaŭ estas produktitaj, ekz. en Rusio furoras kuboj en formo de longforma prismo pezanta ĉirkaŭ 15 g. Tio rilatas al tio, ke teo ofte estas trinkita tie per sukerkubo enmetita inter la antaŭaj dentoj. Sukerkuboj estas plej ofte uzataj por dolĉigi varmajn trinkaĵojn en centra kaj orienta Eŭropo, kaj estas malpli oftaj aliloke.

Koloro

La koloro de sukero povas esti varia, sed la plej ofta koloro estas la blanka, kiu estas akirita per rafinado de sukero sen aldono de tinkturfarboj.



Bruna sukero



Blanka kristala sukero



Sukerkuboj



Melaso

De sukerbeto al sukero mem - koncize

En nia lando, sukero estas produktita el sukerbetoj. Post la rikolto aŭtune, la betoj estas transportitaj de la kampo por prilaborado al sukerfabrikoj. Post purigado, la betoj estas raspataj al tiel nomataj nudelo-similaj tranĉaĵoj, el kiuj la sukero estas ĉerpita per varma akvo (70°C). La rezulta suko estas laŭgrade koncentrigita kaj poste lasata kristaliĝi. La rezultaj sukerkristaloj estas finfine apartigitaj de la siropo en centrifugilo. La preta sukero estas ordigita laŭ grajna grandeco kaj plene aŭtomate pakita por uzo en hejmoj kaj por grandaj klientoj kaj komencas sian vojaĝon al la komerca reto.

Produktado de sukero el sukerkano

Sukerkano estas kultivita de sukerkanaj plantoj, kiuj povas esti rikoltitaj post dek unu ĝis dek ok monatoj. Ĉiu planto povas ripete produkti ĝis sep sinsekvajn rikoltojn. Tiam ĝi devas esti anstataŭigita per la nova. Rikoltado estas farita meĥanike aŭ permane. Post rikoltado, la tranĉita kano devas esti prilaborita kiel eble plej rapide por konservi la sukeron kaj malhelpi ĝian difekton de mikroorganismoj. Tial sukerfabrikoj troviĝas kutime proksime de plantejoj. La sukerkano estas purigita, muelita, premata kaj poste la sukerkano estas lavata per varma akvo. La suko akirita estas filtrita, koncentrita en vakuaj vaporigiloj kaj poste submetita al kristaliĝo. La sukero tiam estas apartigita de la patrinlikvaĵo per centrifugado. La sukero akirita tiamaniere estas parte purigita kaj haveblas en kristala, mikrobiologie stabiligita formo. Ĝi povas esti stokita kaj transportita al rafinejoj ĉirkaŭ la mondo laŭbezone.



Monumento kun granita „sukerkubo“ en Dačice

Granita monumento estis konstruita en 1983 kiel memorigilo al la 140-a datreveno de la komenco de produktado de sukercuboj en Dačice. En 2012, en ĝia tuja ĉirkaŭaĵo estis instalitaj memortabuloj memorigantaj la jaron 1843 en dek du lingvaj mutacioj, kiam la invento el Dačice - kuba sukero - komencis sian triumfan vojaĝon tra Eŭropo kaj mondaj merkatoj. La monumento staras en la parko proksime de la alta renesanca turo de la preĝejo de St. Laŭrenco.



Karl Anton Maximilian Dalberg



Blazono de la familio Dalberg



Simbola granita monumento kun „sukerkubo“

Kompilis helpe de retaj informoj kaj esperantigis Josef Kříž, Ĉeĥa resp.

JUDr. Karel Loevenstein (1885-1938)



Alia gravulo de nia industria historio estis disvolvinto de la entrepreno Škoda Plzeň d-ro Loevenstein. Li naskiĝis en Hradec Králové, en 1903 abiturientiĝis en gimnazio kaj post unujara soldatservo ekstudis juran fakultaton ĉe Karola-Ferdinanda universitato en Prago. En 1911 d-ro Loevenstein ricevis funkcion en praga filio de viena banko Wiener Bankverein, sed la laboro lin ne kontentigis. En 1919 li akiris okupon en entrepreno Škoda kiel sekretario de ĝenerala direktoro. Liamerite la fabriko ne bankrotis, ĉar li prizorgis anglan prunton en 1923, en 1925 la entrepreno englutis firmaon Laurin & Klement kaj fondis firmaon Avia kun aviadila tekniko. En 1923 li fariĝis ĝenerala direktoro de la konzerno. En 1930 la konzerno havis 25 700 dungitojn. Pli multajn havis nur Baťa.

(Bildo el ĉeĥa Vikipedio)

Ekskurso al Vroclavo

Kun silezia esperantista klubo en Vroclavo (Wroclaw, Vratislav) ni kunlaboras dum multaj jaroj. Ilia prezidantino Teresa Pomorska ĉiujare alveturas al Svitavy kun sia klubo. Tial ni decidis, ke ĉi-jare ni veturos al ili en Vroclavon. Aliĝis al ni ankaŭ la geedzoj Melichárek el Vacenovice.

Nia ekskurso realiĝis en la tagoj 18 – 22 de aŭgusto 2022. Bonvenigis nin vicprezidanto Michal Balicki. Li montris al ni la klubejon, konatigis kun klubaj aktivadoj kaj ĉiĉeronis tra la urbo al la lokoj, kien ni kiel normalaj turistoj ne irus. Michal estis tre afabla kaj kompleza. Dum adiaŭo ni invitis lin al inaŭguro de nia nova ekspozicio en Esperanto-Muzeo en Svitavy. Li ekridetis, sed fordankis la inviton, ĉar tiutempe li edziĝos.



En la vroclava klubejo

Aliajn klubanojn ni ne vidis, ĉar okazis neplanita ŝanĝo. Ĉar ne efektiviĝis somera seminario SES, la ceteraj klubanoj forveturis al itala Esperanto-kongreso.

Reston de tempo ni uzis laŭ propraj

intereso. Ni vizitis preĝejojn inkluzive de katedralo de St. Johano Baptisto, Nacian Muzeon, la plej malnovan ZOO en Pollando, kiu apartenas al plej grandaj en Eŭropo, botanikan ĝardenon, japanan ĝardenon malantaŭ la Halo de Jarcento, konstruita okaze de 100-a datreveno de venko super Napoleono kaj en 2006 registrita kiel memoraĵo de Unesko. Unu el la vesperoj ni dediĉis al ŝipveturado tra la nokta urbo sur la rivero Odra.



Michal gvidas nin tra la urbo

La urbon ni rigardis ankaŭ de la turo de preĝejo konsekrita al Sankta Elizabeta. Kelkaj ĝuis futbalan matĉon, aliaj noktan urban tumulton. Tra la urbo estas lokitaj centoj da koboldoj kaj ĉiu havas sian rakonton. Ne ne forgesis foti nin ĉe la 17-a meridiano, kiu kondukas tra la Universitato. Sed plej granda ravo atendis nin ĉe Raclawicki-panoramo, kiun ni rekomendas al ĉiu vizitanto. Revenante el Italio la Vroclavanoj haltis en Svitavy, kie ni havis preparitan programon.

Ing. Libuše Dvořáková

La 89-a Itala Kongreso de Esperanto en Breŝo

20-27.8.2022

Ĉi-foje ĝi okazis en la itala urbo Breŝo (Brescia) situanta en la norda parto de Italio, regiono de Lombardio, inter Milano kaj Verono. Apud la kastelo kiu dominas la urbon staras vaporlokomotivo. La kongresejo troviĝis en la hotelo *Ambasciatori*. En la enirhalo instaligis akceptejoj kaj libroservo.



Al la evento aliĝis pli ol 200 geesperantistoj, sed ne ĉiuj povis veni. Teresa Pomorska el Pollando venigis grupon de 27 adeptoj por Esperanto, kiuj entuziasme frekventis la Esperanto-kursojn, kiuj okazis en la apuda hotelo *Master*. La kurson por komencantoj gvidis pakistatano loĝanta en Italio Mian Salam Shany kaj la progresantojn instruis Marc Giraud el Francio. Eblis ankaŭ lerni la italan lingvon kaj okazis ekzamenoj de IIE (Itala Instituto de Esperanto).

Kiel jam sciante, la italaj Esperanto-kongresoj estas renomaj pro altnivelaj, plej variaj kaj interesaj programeroj. La temo de la ĉi-jara kongreso estis "Paco ne okazas hazarde: la aktiva rolo de

ĝemelurbaj rilatoj en la konstruo de eŭropa popolo". Temis pri ĝemelaj urboj, pri kiuj dum la solena inaŭguro okazanta en la urba Aŭditorio *San Barnaba*, François Lo Jacomo emfazis la gravan kaj utilan rolon de ĝemeliĝo por interkompreno en kiu ankaŭ Esperanto povas favore kontribui. Samtempe en la loko eblis aĉeti poŝtkartojn kun speciala stampo. Posttagmezo estis rezervita por gvidata promeno tra la urbo por eksterlandanoj, dum italoj havis sian jarsembleon.



La programo kontentigis ĉies postulojn. La matenojn plenigis seminarioj pri: "Nunaj konfliktoj en la Mediteraneo" fare de Javier Alcalde. Pri Sociaj retejoj: "Kiel starigi kaj prizorgi ilin?" AMO-seminario, zorgita de Debora Rossetti.

Dum la prelegoj ni povis ekscii pri "La historio de la okcitanaj lingvo kaj kulturo" de ties spertulo Jean-Marc Leclercq (JoMo), pri "Hibridaj trajnoj por plibonigi la medion" donis informojn Vito Tornillo. Pri "Kulturhistorio kaj pri ĝemelaj urboj" prelegis Detlef Haussner.

Pri "30 oraj horoj kaj instruado en la lernejoj" informis Brunetto Casini. Pri "Ateistoj" parolis Anna Löwenstein. Pri "La biokemio de la enamiĝo" informis Luigi Fraccaroli. Pri "La itala lingvo en Svislando" kompetente parolis Mireille Grosjean. Kunvenis ankaŭ itala sekcio de ILEI.

Ĉiutage okazis libroprezentadoj. Ni ankaŭ spektis projekciadon de la filmo "Pino-hazarda vivo de anarkiisto", dediĉita al la esperantisto Pinelli. Pri "Esperanto kaj Anarkiismo" parolis Javier Alcalde.



La organizantoj prezentis kaj donis informojn pri la venonta UK en Torino okazonta fine de julio kaj komence de aŭgusto 2023.

Pri nia aranĝo interesiĝis ankaŭ ĵurnalistoj. Venis televid-teamo, okazis intervjuoj kaj poste aperis artikoloj en loka ĵurnalo. En la publika dulingva debato "Kia rolo por la ĝemelaj urboj, pri la strebado al la paco en la Eŭropa kontinento", partoprenis reprezentantoj de la urbo.

Riĉ-enhavaj estis ĉiuj vesperaj programeroj, kiujn ni ĝuis en subĉiela korto de la palaco *Broletto*, kie okazis Festivalo de Esperantista Kulturo. Ili estis alireblaj al ĉiuj civitanoj pri kio

zorgis la urbaj instancoj. En busoj estis pendigitaj informoj pri la UK en Torino.

La vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programeroj. Plurlingvajn kantojn liveris kaj entuziasme kantis JoMo, koncertis Kim kaj Radio-mondo, Chiara Raggi kaj Mario Migliucci prezentis rakonto-koncerton, Piero Nissim kaj Franco Meoli kantis "la ĉiamverdajn kantojn" kaj ne mankis itallingva teatraĵo "Doktoro Esperanto".

En la programo ne mankis pluraj tuttagaj kaj kelkaj duontagaj ekskursoj, kiujn bonege prizorgis Emanuele Regano. Tuttagaj ekskursoj direktiĝis al la urboj Milano, Bergamo kaj Verona. Naturon oni povis ĝui ĉe la lagoj de *Garda* kaj *Isola* kaj dum la duontaga ekskurso oni povis gustumi vinojn en *Franciacorta*, fama loko pro vinproduktado.

Post la resumo de la laboroj polaj esperantistoj ĝoje kantis dankante al la organizantoj kaj poste la kongreso fermiĝis. Vespere ni povis denove kanti kun Debora Rossetti kaj Luigi Fraccaroli. La kongreso bone sukcesis malgraŭ la sufoka tropika vetero.



Venontjare la Itala Kongreso ne okazos pro la UK en Torino. Do, vi ĉiuj estas jam ekde nun invitetaj partopreni la Universalan Kongreson en tiu impona urbo.


Liba Gabalda

PARTOPRENU EN DUOLINGO-KUNVENOJ: NOVA AGADO DE UEA KAJ TEJO

Duolingo havas eblecon, kiun malmulte da homoj konas: la **retajn kunvenojn**. *Se vi lernas* Esperanton per Duolingo kaj volas plibonigi vian kapablon paroli en la lingvo, profitu de tiu ĉi nova agado de UEA kaj TEJO: ni okazigos paroligajn renkontiĝojn per la sistemo de Duolingo, en kiuj vi povos partopreni ĉiusemajne kaj babili pri malsamaj temoj kun aliaj Esperantistoj el diversaj landoj. *Se vi bone parolas* Esperanton, sin proponu por helpi kungvidi la babilkunsidojn en Duolingo.

La paroligaj kunsidoj daŭros 30 minutojn kaj okazos per Zoom. Vi povas kontroli la eblecojn ĉe

classes.duolingo.com.



La nomo de niaj kunvenoj estas "Babilu kun amikemaj esperantistoj" kaj dum 10 sinsekvaj semajnoj estas planataj kunvenoj, kiuj komenciĝos la 12-an de septembro. Ĉiuj, kiuj partoprenas en tia sesio, ricevas 250 poentojn per la sistemo de Duolingo! Aldone estas diversaj aliaj kunvenoj por lernantoj de Esperanto, kiel la lecionoj pri gramatiko gvidataj de Anna Lowenstein nome de la Londona Esperanto-klubo (tiuj okazas en la angla) kaj multaj aliaj. La lecionoj de

la klubo ligiĝas al alia grava agado lanĉita ankaŭ ĉi-monate: la retaj Esperanto-kursoj por komencantoj (A1) ĝis progresintoj (C1):

londonaesperantoklubo.com/OnlineEsperantoCourses.html.



Se vi jam parolas Esperanton flue kaj volas kunlabori kun la kunvenoj "Babilu kun amikemaj esperantistoj", kontaktu la komisiiton de UEA kaj TEJO pri tiu reta agado, Karina Oliveira, per la retadreso kgsoliveira@gmail.com aŭ per Telegramo (@librulino). La kunlaborantoj devos nur veni kaj respondeci dum 20 minutoj pri paroligo de la lernantoj en malgrandaj grupoj laŭ la rimedoj de Zoom. Karina zorgos pri ĉio teknike kaj enhave.

Se vi volas subteni la agadon pri membrovarbado de UEA kaj TEJO, vi bonvenas donaci al Fondaĵo Canuto: uea.org/alighoj/donacoj/canuto. Tio subtenos la aliĝon de komencantoj en UEA kaj TEJO.

GK UEA n-ro 1065

Esperanto en amaskomunikiloj

Pri fondo de la ĉeĥa Vikipedio

Sabate la 27-an de aŭgusto 2022 publikigis la ĵurnalo Deník intervjuon de redaktoro Pavel Podešva kun Miroslav Malovec pri fondo de la ĉeĥa Vikipedio. Post 10 tagoj la interparolo aperis en la interreto, sufiĉas skribi al Guglo „Deník Malovec“ kaj la sistemo trovos regionajn variantojn.

Pri KAVA-PECH

En la aŭtuna numero 2022 de la gazeto TOP por tradukistoj kaj interpretistoj aperis artikolo de Petr Chrdle (p. 24) *Granda Ĉeĥa-Esperanta Vortaro*, sed priskribita estas ankaŭ alia esperantlingva eldona aktivado de la firmao: *Esperanto pro ĉi ti, Esperanto od A do Z, Esperanto přímou metodou, Rim-enigmoj, Bonvenon en nia mondo*. Plej detale estas priskribita la ekesto de la vortaro.

Granda Esperanta-Ĉeĥa Vortaro estas nun senpage elŝutebla en formato PDF en la retejo de KAVA-PECH

www.kava-pech.cz

Antaŭ 150 jaroj naskiĝis F. V. Lorenz

VERNISÁŽ VÝSTAVY JAKUBA KUTÍLKA | 14:30

7. 10. 2022 | 14:30
KNIHOVNA F. V. LORENCE VRDY

PŘEDNÁŠKA PETRA CHRDLÉHO O F. V. LORENCOVI | 15:00

letos si připomeneme nedožitě 150. narozeniny slavného rodáka

Petr Chrdle preparis por la biblioteko en Vrdu prelegon pri la vivo de FVL (por la 7-a de oktobro 2022).

Renkontiĝo en Svitavy

La 10-an de septembro 2022 renkontiĝis en Esperanto-Muzeo en Svitavy 14 esperantistoj. Unue Ing. Libuše Dvořáková prelegis pri ekskurso de la klubanoj al Bjelovar antaŭ tri jaroj kaj al Vroclavo antaŭ tri semajnoj (vidu p. 85). Poste la partoprenantoj vizitis preĝejan turon kun akompana klarigo de Jan Richtr, ekspozicion de lignaj statuoj kaj spektis filmojn pri la solenaj okazaĵoj de Ottendorfer-domo kaj vizitis la deponojn de la restintaj 6 mil germanlingvaj libroj el iama biblioteko.




Leonarda Chaloupková interparolas kun Blanka Čuhelová, iama (nun emerita) direktorino de la Urba Muzeo kaj Galerio en la deponejo, kie restis proks. kvarono de la libroj. (foto O. A. Fischer).

Nia filmo el UK Montrealo



Petroj Chrdle kaj Baláž, ununuraj ĉeestantoj de iama Ĉeĥoslovakio



Dorota Rodzianko, ĉefino de nove kreita Kongresa fako de UEA



Estraro respondas – regula programero de la UKoj



Joel Rabu – kanada kanzonistino kantanta en Esperanto



Jobati – brazila indiĝeno denaske parolanta la tupian lingvon

Petro Chrdle

Předplatné časopisů 2023

Předplatné na rok 2023 zaplacené do konce října 2022 je u všech časopisů stejné jako na letošek (viz Starto 2/22, p. 62). Zprostředkovatel:

Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poďěbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. 723 672 335. Předplatné uhradíte na účet u Equabank, č. ú. 101 953 9617/6100, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů.


Jedná se o časopisy **Monato**, **Juna Amiko**, **Literatura Foiro**, **La Ondo de Esperanto**.

Věra Barandovská-Frank

*17.8. 1952



Naskiĝis en Opava, studis latinon kaj la francan kaj italan filologiojn en Brno kaj sekve laboris kiel lingvopedagogo. Unu el fondaj membroj de ĈEA, ekde la 1970-aj jaroj instruis Esperanton i.a. en SET Lančov, en 1984-1988 ŝi estis estrino de la Pedagogio Sekcio de ĈEA.



Aŭtorino de la konata lernolibro *Esperanto pro samouky* (SPN 1989). En 1988 ŝi edziniĝis al prof. Helmar Frank kaj ekde tiam vivas kaj agas en Germanio. Ŝi habilitiĝis pri interlingvistiko en AIS

San Marino kaj fariĝis docento en la Universitato en Paderborn. Ŝi instruis interlingvistikon en la Universitato en Poznano kaj kontribuis plurlingve per artikoloj al la faka gazetaro.

Tre valoras ŝia [Enkonduka lernolibro de interlingvistiko](#). Ŝi prelegis dum UKoj kaj Malfermaj Tagoj de UEA. En la ĉeĥa akademia medio estas ofte citata ŝia libro *Latina jako mezinárodní jazyk* (KAVA-PECH 1995).

—padv—

Tomáš Pumpr

(2.10.1906 – 10.9.1972)



Naskiĝis en Dolní Slovĕnice apud České Budějovice kaj laŭprofesie estis juristo. Post esperantiĝo en 1926 lia unua literatura kontribuo estis 12 tradukoj por la *Ĉeĥoslovaka Antologio* (1935). El lia admirinde ampleksa traduklaboro estis libro-forme eldonitaj nur *La bapto de caro Vladimír* de Borovský (1935, 1967), *Bukedo el ĉeĥaj naciaj mitoj* de Erben (1938), *Sileziaj kantoj* de Bezruč (1971 – kune kun Hromada kaj Kořínek) kaj *Majo* de Mácha (1997). Multaj tradukoj aperis en gazetaro kaj multaj ankoraŭ restas en manuskriptoj. Menciendas ankaŭ liaj tradukoj de tekstlibretoj por la operoj *Vendita fianĉino* de Smetana, *Najado* de Dvořák kaj *En la puto* de Blodek. Li kunlaboris ĉe la eldono de *Poŝatlaso de la mondo en Esperanto* (1971) kaj tradukis la informan broŝuron *Mallonge pri Ĉeĥoslovakio* (1966). En 1948-1950 li kontribuis al la radioprogramoj de Verda Stacio Praha per tradukoj de la verkoj de Jirotko, Kožík, Šrámek kaj Mrštík.

Ekde 1962 li estis membro de la Akademio de Esperanto, ekde 1969 honora membro de ĈEA.

—padv—

JUBILEANTOJ DE JULIO, AŬGUSTO KAJ SEPTEMBRO 2022

PhDr. Věra Barandovská-Frank, Opava
Milena Buřinská, Ratíškovice
Karel Čada, Žamberk
František Dadák, Hranice
Blažej Dub, Božetice
Ing. Ivan Gavanda, Bludov
Mgr. Leonarda Holubová, Strakonice
Ing. Jiří Hudera, Světlá nad Sázavou
Dana Jahodová, České Budějovice
Tadeusz Karaš, Kamenice nad Lipou
Vladimir Kasjanenko, Praha
Jana Kopecká, Duchcov
František Liška, Šumperk
Věra Marešová, Pelhřimov
Ing. Miroslav Melichárek, Vacenovice
Josef Novák, Jablonec nad Nisou
Ing. Klement Pustějovský, Hukvaldy
Mgr. Emilie Rybičková, Opava
Jiří Souček, Praha
Anna Vlková
RNDr. František Wohlmuth, Ostrov nad
Ohří
Marie Zatloukalová, Velká Dlážka

Al la jubileantoj ni deziras firman sanon,
kontenton kaj ĝojon en iliaj pluaj jaroj!

Trovita foto el 1972



Margit Turková trovis foton de Oldřich Kníchal kaj Kei Kurisu sur la supro de Fuĝi.



Foto Dušan Dostál

Invito al koncerto

Koncerto de la geedzoj Richard Haan (operkantisto de Nacia Teatro) kaj Jolana Smyčková (kantistino kaj aktorino de teatro Semafor, filino de Miroslav Smyčka) okazos en Semafor la 3-an de novembro 2022. Jam nun estas biletoj aĉeteblaj ĉe Semaforo.



Foto Dušan Dostál

Jolana Smyčková koncertas ankaŭ kun Jiří Suchý.

Ni kondolencas:

■ La 16-an de aŭgusto forpasis s-ro **Georgo Milev**, 69-jara. Li estis multjara ano de la klubo en Karlovy Vary. Rememoru la ĉiĉeronon, kiu violonludis. Per muziko li disdonis ĝojon al partoprenantoj dum turismaj renkontiĝoj en Ercmontaro (ITREE '79-'91), kaj dum kongresoj en Karlovy Vary (SAT '99, ILEI '99, Ĉeĥa-germana '93).



Miloš Bloudek

Helena Supová-Halířová (1927-2022)

La 27-an de junio 2022 forpasis operkantistino kaj muzika pedagogino Helena Supová-Halířová, kiu kun sia edzo Václav Halíř (1926-1999) preparis por esperantistoj ĉirkaŭ 50 koncertojn inter la jaroj 1950-2004. Ili kantis dum la Konstitucia Kongreso 1969 en Brno, dum la Universala Kongreso 1996 en Praha kaj plej ofte en la klubo de Brno. Kun ili ankaŭ kelkaj kolegoj el la Janáček-operejo kaj ŝiaj studentoj.

Esperantajn oper-takstojn por ili tradukis Jiří Kořínek kaj melodiojn por piano adaptis Vilibald Scheiber, kies lernantino ŝi estis.



La geedzoj Halíř en Opava 1980

Ŝi postlasis siajn rememorojn pri profesoro Scheiber.

Ŝi naskiĝis en Velká nad Veličkou, studis en konservatorio en Brno, kie ŝi konatiĝis kun Václav Halíř, nelonge ŝi kantis en operejoj en České Budějovice kaj Brno. Ŝi studis ankaŭ muzikan sciencan en Brno, kantadon en Praha, gvidis plurajn kanthorojn, pedagoge aktivis en Mikulov kaj Moravský Krumlov. Pro siaj arto kaj laboro ŝi ricevis premion Bedřich Smetana.



Prof. Helena Supová-Halířová dum festado de 100 jaroj de EK Brno en 2001

Miroslav Malovec

Muzeum esperanta Svitavy

Vernisáž výstavy

FAKAJ ASOCIOJ

21. – 23. 10. 2022



Klub přátel esperanta ve Svitavách
Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy
náměstí Míru 81/1, CZ-568 02 Svitavy, Česka republika



Pátek :

18:00 hod. – večeře

19:30 hod. – Poludnica – krátký film + vyprávění Petera Baláže a dalších účastníků

Sobota:

9:30 hod. – vernisáž výstavy, uvítání hostů, zdravice

10:00 hod. - přednáška o F.V.Lorencovi – L. Dvořáková

10:00 hod. - představení knih Petra Chrdleho a Petera Baláže

12:00 hod. - oběd

13:30 hod. - přednáška IFEF kongres – Ladislav Hakl + video z kongresu v Berouně

15:00 hod. - přednáška KAEST dříve – Petr Chrdle

16:00 hod. - přednáška KAEST nyní – Peter Baláž

17:30 hod. - večeře

19:00 hod.- „Hrátky s čertem“ – divadlo DOMA

20: 00 hod. - návštěva esperantistů na Madagaskaru – Mária Pilková

Neděle: 9:00 hod. – 100 let od narození Eli Urbanové – Petr Chrdle + recitace básní – Mária Pilková

- činnost Klubu přátel esperanta ve Svitavách za rok 2020 - 2022

Přihlaste se předem

Libuše Dvořáková
dvor.libuse@seznam.cz

Praga Esperanto-klubo

invitas vin partopreni feston de

la 120- datreveno de la Praga E-klubo

11. – 13. 11. 2022



Atendas vin rakontado pri historio de la klubo, promeno tra gravaj lokoj, kiuj rilatas al la historio de la klubo, projekciado de filmo kun E-subtekstoj, prezentado de libroj kaj eblo aĉeti ilin, kultura vespero ...

Partoprenkotizo: 700 Kč. Ĉefa parto de la kotizo kovras sabatan tagmanĝon kaj vespermanĝon, luon de la ejo.

Loĝigo: Hostelo en centro de Prago (Spálená strato) en 4–5-litaj ĉambroj, kun kuirejeto. La ejo ne estas senbariera. La lokoj estas limigitaj. Loĝigo por 2 noktoj estas 900 Kronoj.

Manĝaĵo: *Matenmanĝon* prizorgas ĉiu mem. Partoprenantoj, kiuj havas loĝigon, povas uzi kuirejon ĉe ĉambro. *Vendreda vespermanĝo:* restoracio en Podolí (ĉiu pagas mem). *Sabata tagmanĝo* kaj *vespermanĝo:* restoracio AdAstra. *Dimanĉa tagmanĝo* – loko laŭ nombro de interesigantoj.

Tomáš Břicháček

t.brichacek@seznam.cz

Aliĝilo ĉe www.esperanto.cz

**Periodikum Ĉeského
esperantského svazu, z.s.
53. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117
Uzávěrka příštího čísla:
15.11.2022**

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 53-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj**

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz**

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva
numero: 15.11.2022**

ISSN 1212-009X

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.**

KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopaj prelegojn sekvu en
Eventaservo.org
kaj [Kalendaro de Esperanto.cz](http://Kalendaro.de.Esperanto.cz)

Ĉiun duan merkredon virtualaj kunvenoj de
E-Klubo en Brno - gastoj bonvenas!
Fizikaj renkontoj en Hybešova 65a alternas kun
la virtualaj. <http://esperantobrna.cz>
info: brno@esperanto.cz

2022-10-07 150 jaroj de F.V. Lorenc en Vrdy
2022-10-07/09 Fervojistoj en Prudká
2022-10-21/23 Renkontiĝo en Svitavy kaj
Inaŭguro de ekspozicio pri fakaj asocioj de
UEA kaj pri Lorenz
2022-11-12/13 120 jaroj EK Praha
2022-11-17 kaj 22 KER-ekzameno Bartošovice
2022-11-27 Produktado de „bondeziroj“ en
Svitavy
2022-12-04 Marcipana Kristnasko en Svitavy

2023

2023-09-15/17 ĈEA-konferenco en Sudmoravio



**Pri ĈEA-kongreso en
Pardubice alportos raporton
la venonta numero.
Sur la paĝo 66 vidu la novan
asocian komitaton.**



fotis Vlado Rataj

La 25-a renkontiĝo de eksaj tendaranoj en Lančov



Vroclavanoj en Svitavy



Esperanto-Muzeo en la tago de veteranaj aŭtomobiloj



Bonfara aranĝo Briko en Prago 2022



Svitavanoj en Vroclavo



„PARALELA UNIVERSO - Loke ĉeestu, globe festu", (internacia iniciato) okazis 20.8. en Prago en agrabla kafejo. Ne mankis esperdona nova generacio!